Nu, kien iras mia viv'

(originale verkita en Esperanto)



2. La gloro estas mia cel',
la amo mia vojo.
La sun' min prenas el malhel'
kaj el soif' la rojo.
Tiele mi de fort' al fort'
pilgrimas transen, tra la mort',
al Di', al Lia ĝojo.

3. Do: Sonu mia dank' al Di',
la Patro, Fil', Spirito;
ĉar mian vivon vivas Li
kun mi sen intermito.
Li, mia puls', Li, mia spir',
la fund' de mia kordezir',
vivigas sen merito.

NU, KIEN IRAS MIA VIV' • M kaj E (originale verkita): Albrecht Kronenberger 2021-10-05

Oni povas elekti alian sam-ritman melodion (la tiel nomatan Luteran Strofon), ekzemple:

ADORU 093 Sei Lob und Ehr - Crüger
ADORU 245 Ich steh an deiner Krippen hier - Bach
ADORU 494 Luther's Hymn - Luther
ADORU 528 Lobt Gott den Herrn, ihr - Vulpius
ADORU 771 Aus tiefer Not - Luther